# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 9 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 9

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12


## Raporto pri la fakkunveno dum la IX. SAT-Kongreso en Leipzig

La fakkunveno de la liberpensuloj okazis la 7-an de aŭgusto en la Popoldomo, vespere je la 20-a h. Ĉeestis 75 Gek-doj el jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Dancigo, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Germanio. Estis reprezentataj: Internacio de Proletaj Liberpensuloj per K-do prof. Hartvig, Vieno, Asocio de Socialistaj Liberpensuloj per K-do Wiesner, Leipzig, kaj aliaj estrarmembroj, Asocio de Proletaj Liberpensuloj por Rejnlando kaj Vestfalio per K-do Burger, Essen, Asocio por Liberpenseco kaj Kremacio per K-do Rode, Leipzig, Ligo Materialista de Belgio per K-doj Desmet kaj Destrée, Bruselo. Eniris salutletero de Ateista Sekcio de Sovetrespublikara Esp-ista Unio. La Unio de Militantaj Ateistoj USSR estis sendinta 50 broŝurojn de la esperanta eldono "Lenin, Pri religio" kiel donacon por la partoprenantoj de la fakkunveno. La Opozicio de la "Asocio por Liberpenseco kaj Kremacio, Loka grupo Leipzig" estis disdoninta la aŭgustan numeron de sia "Weckruf" (Vekvoko) kiu enhavas salutskribon esperante kaj germane. Gvidis la kunvenon K-do Klaps, Dancigo. K-do Hubricht, Leipzig, donis raporton pri la agado kaj sukcesoj de la sekcio: "Sennaciula Liberpensula Paĝo" aperis ĝis nun sepfoje kaj Liberpensula Gazetservo okfoje. Li plendis pri la neaktiveco de la liberpensulojesp-istoj. Tamen la sukcesoj estis relative kontentigaj. La gazetoj "The Freethinker, Le Matérialiste, Der proletarische Freidenker, Atheist, Bezboĵnik, Der Sozialistische Freidenker" k. a. regule ĉerpis el nia gazetservo. En la lasta n-o de "Der proletarische Freidenker" estas presita la tuta Bulteno n-o 6 en esperanto. Per la proletaj espistoj estas fondita liberpensula organizo en Svedio kiu jam aliĝis al Internacio de Proletaj Liberpensuloj. Ligo Materialista de Belgio aranĝis Esp-istan Fakon. Sekvis la parolado de K-do prof. Hartvig pri "Esperanto kaj la liberpensula movado". La teksto estos publikigata en la oktobra n-o de "Liberpensula Paĝo en Sennaciulo". Tiam oni diskutis pri la proponita Labor-programo, kiun estis ellaborintaj K-doj Adamson-Göteborg, Incertov-Moskvo, Muravkin-Berlin, Hubricht-Leipzig. Post malgrandaj aliigoj oni akceptis la laborprogramon. Ĝi aperos en la novembra numero de nia Paĝo. Raportis K-do Klaps pri la stato de la kaso. Eniris kotizoj je sume 123.10 mk. g.; la elspezoj sumiĝas je 84.— mk. g. Restas havaĵo de 39.10 mk. g. En la laborkomitaton oni elektis kiel Landreprezentantojn: Adamson-Göteborg, Incertov-Moskvo, Burger-Essen, Chapelier-Bruselo, Coll-Grenoble, Korinna-Halifax, Fröding-Rockford, Klaps-Dancigo, Halpern-Lublin, Perhak-Budejovice, Roosing-Zeist, Neuwirth-Bregenz; kiel Sekretarion-kasiston: K-don Klaps-Dancigo; kiel Redaktanton: Kurt Hubricht, Leipzig. Prof. Hartvig proponis elekti iun kiel daŭran peranton inter la Sekcio kaj la IPF. Estis destinata kiel peranto inter IPF kaj la Sekcio K-do Kurt Hubricht-Leipzig.

---

## LIBERPENSULOJ-ESPERANTISTOJ!

El la supra raporto vi vidu, ke ni kreis dum la fakkunsido firman bazon por plua vigla agado; estas nun via devo subteni la Sekcion per via tuja aliĝo kaj kunlaboro. Observu la liberpensulan movadon en via regiono kaj ankaŭ religiajn okazaĵojn, verku koncizajn artikolojn pri ili sendante, ilin al nia redaktanto. Ni esperas, ke la partoprenintoj al la lasta fakkunveno iĝos daŭraj kunlaborantoj.

---

## SUKCESO EN BELGIO

Laŭ propono de sia Ekzekutiva Komitato, la Centra Komitato de la Ligo Materialista de Belgio voĉdonis la sekvantan rezolucion:

Estas aranĝita fako esperantista, kiu disvastigos ĉiulanden la materialistajn principojn per esperanto, kaj rilatos kun SAT-Liberpensula Fako.

Artikoloj kaj gravaj leteroj estu submetotaj, laŭokaze, al la Ekzekutiva Komitato aŭ al la Redakcia Komitato, kiuj estas respondecaj antaŭ la anaro de la L. M. B. C. K. enskribas, ke nuntempe ses el siaj membroj estas samtempe SAT-anoj.

Aprobas, ke K-do Emile Chapelier estu sekretario de tiu fako.

Prezentas al la proleta esperantistaro siajn revoluciemajn salutojn.

LA EKZEKUTIVA KOMITATO

C. Serwy. J. Gueux. Emile Chapelier.

---

## NI FONDU ĈIUJARAN INTERNACIAN TAGON DE ATEISTOJ

La legantoj kaj korespondantoj de sovetia ateista gazeto "Bezboĵnik" proponas starigi ĉiujaran tutmondan ateisto-tagon, dum kiu liberpensuloj-ateistoj de ĉiuj landoj, de ĉiuj nacioj unuigite elmontros siajn fortojn kaj unuigit-fronte atakos religiojn, priservantajn la klasmalamikon de l' Proletaro. Ni opinias, ke ĉi tiu propono estas akceptinda. Ĉiuj liberpensulaj organizoj kaj gazetoj devas en siaj kunvenoj kaj paĝoj pridiskuti la demandon. La virinoj havas Internacian tagon, la junularo ankaŭ, Internacia Ruĝa Helpo ankaŭ: Fondu Internacian Tagon Ateistan ankaŭ ni ĉiulandaj liberpensuloj, kontraŭreligiuloj proletaj!

## LETERO EL ANGLIO

Mirinda provo de la senmorta povo de la Eklezio en Anglio okazis komence de julio en vilaĝo apud la fama universita urbo Kembriĝ (Cambridge). Iu arinomisto (?)[1], kiu estas ankaŭ urba konsilanto, aĉetis dum 1916 pecon da tero kaj en la vendkonsent-dokumento estis menciita, ke la aĉetanto estus devigota riparigi, laŭ la menciitaj antikvaj ekleziaj leĝoj, la preĝejon de la vilaĝo. S-ro Stevens, la aĉetanto kaj akuzito, neas, ke li sciis pri tiuj leĝoj kaj devo riparigi la preĝejon.

Sekve, kiam la preĝeja zorgantaro decidis riparigi la preĝejon, ĝi alvokis s-ron Stevens kaj atentigis lin pri la necesaj difektoj. Li estis surprizita kaj rifuzis farigi la riparojn. La preĝantaro lin akuzis antaŭ la Eklezia Juĝantaro en Kembriĝ kaj tie li estas juĝita malprava en sia rifuzo ne fari la riparojn. Li persiste rifuzis kaj sekve la Eklezia Juĝantaro arestigis lin per la polico. S-ro Stevens rifuzis akcepti la aŭtoritaton de la Eklezia Juĝantaro, sed la pruvo pri la respondeco estis skribita en antikva dokumento el la jaro 1871.

Post kelkaj tagoj de enkarcerigo, la leĝisto prizorgante la aferojn de s-ro Stevens, konsilis lin promesi fari la riparojn. Li promesis tion kaj nuntempe li estas ree libera. S-ro Stevens estas kristano.

* * *

Angla ĵurnalo nun provas transformi la faman ĉinan gvidinton d-ron Sun-Jat-Sen en kristanon. La ĵurnalo diras: "Nuntempe li estas objekto de memorservoj en kelkaj kristanaj preĝejoj en Ĉinio. Oni laŭdas lin kiel sciencistón kaj ĉefdirektinton de gehomoj kaj ankaŭ kiel kristanon, kies plej ŝatata religia kanto estis 'Jesuo, Amanto de mia animo', kaj la Tutĉinio lin laŭdas kiel homon, pere de kiu ĉinoj trovas sian veran animon."

Kiel ofte farite, la ekleziuloj provas farigi faman homon — post lia morto — religiulo.

* * *

En Anglio la sola anonco por eltiri la infanojn de l' religia instruado, estas simpla peto al la lerneja mastro. Sed la Nacia Liberpensula Asocio ĵus eldonas presitan dokumenton, kiu faciligos la aferon.

* * *

La respondoj al la tri elektaj demandoj pri religio estas sufiĉe interesaj. Klare kaj honeste kelkaj respondis aŭ jes aŭ ne. Sufiĉe granda nombro rifuzis respondi. Aliaj kandidatoj por parlamento diris, ke ili subtenus religian instruadon, se la publiko tion postulus. Tio estas la karakteriza vidpunkto de anglaj politikuloj. Sekvu, ne gvidu!

L. Korinna.

---

[1] Ĉu "agronomiisto"? — Red.